

Lernokurso 1958-1959

E-grupo aldone al tiuj, ankoraŭ vivantaj tiam, kiuj jam apartenis al la esperantistaj organizaĵoj ekzistintaj en nia urbo antaŭ la milito, sed sen esperantista aktivado.

Sed estis ankaŭ la kazo de novbakitaj aktivistoj por nia movado, kiel Carmen Argüelles (Carmina) kiu, post partopreni la unuan kurson de Alberto Menéndez, restis kiel Esperanto-aktivistino dum la tempo kiam ŝi loĝis en Gijón. La finan tagon de la dua kurso, la 2an de junio 1959, ties instruisto Alberto Menéndez ne povis pro tio prezidi asembleon de la membraro de la grupo. Demarŝis la kunsidon la sekretario, José Ordieres. Inter la pritraktitaj aferoj estis tiu de la organizado de ekspozicio pri presaro. Por tiu tasko estis elektita komisiono konstituita de Alberto Menéndez, José Ordieres kaj la menciita Carmina. Sed en la akto de tiu sama kunsido aperas la nomoj de pluaj novbakitaj aktivuloj de la E-grupo: alia decido de la kunveno estis la kreado de revueto aŭ bulteno de la Esperanto-grupo. Tiam oni decidis eĉ la nomon de tiu bulteno: Ŝpruci. Oni debatis ĉu la bulteno estu dulingva (Hispana-Esperanta) aŭ nur Esperanta; fine la decido estis ke oni publikigu ĝin nur Esperantlingve. Sed tre interesas rimarkigi ĉi tie ke la komisiono nomumita por la ellaborado de tiu revueto estis konstituita de personoj tute novaj en nia historio de la gijona esperantismo, sendube esperantigitaj en la du unuaj kursoj de la Esperantista Grupo Jovellanos.

La membroj de tiu komisiono estis:

Direktoro: Fernando Miguens. Foto-Reportero: Floreal Bedriñana Peláez. Reporteroj: María del Carmen Amez, María Gloria Triviño, Florita Palacios kaj Santiago Mulas.

Tajpistino: María del Carmen Argüelles.

Esceptante la maŝin-skribistinon, Carmina, kiun jam oni menciis por alia komisiono, la ceteraj apearas unuafoje en nia historio. Plejparto el ili, post aktivadi dum iom da tempo en la E-movado, fine forlasis la porEsperantan laboradon. Speciala kaj aparta estas la kazo de Santiago Mulas. Ni rimarku ke la jaro 1959, pri kiu ni estas raportante, troviĝas ĝuste meze de la jarcenta periodo de la historio de la astura esperantismo. Nu, samideano Santiago Mulas travivis kiel konstanta E-aktivulo la ceterajn 50 jarojn de tiu historio ĝis la nuntempo. Laŭlonge de la cetero de nia historia raporto lia nomo aperos ofte kaj multfoje.

La 4an de augusto estis nova asembleo de la membraro de la grupo. Inter aliaj organizaj aferoj, ĉefe en rilato kun la planita ekspozicio, oni elektis novan estraron. En ĝi jam ne plu estis Luis Serrano, kiu translokiĝis al alia lando pro personaj kaj laboraj kialoj. Restas la samaj prezidanto kaj sekretario, kaj eniras ses novaj komitatanoj: kiel kasisto, Floreal Bedriñana Pelaez, voĉdonantoj: Santiago Mulas Gallego, Fernando Miguens, José Palacio Tuero, Carlos Peinador Martínez kaj María del Carmen Argüelles Juanes. Krome al S. Mulas oni komisiis ankaŭ la servon de la korespondado de la grupo kaj la reorganizadon de la biblioteko. Inter la novaj komitatanoj estas tiu José Palacio Tuero, kiu ne estas nova en nia historio; li apartenis jam al **Astura Esperanta Asocio** en la 20aj jaroj, kaj krome li estis membro de la Loka Organiza Komitato de la **16a Hispana Kongreso de Esperanto** okazinta en Gijón en 1955. Tiu samideano vivas ankoraŭ nuntempe (li estas jam centjaraĝa) kaj li daŭre membras ĉe nia E-asocio.